



La Kolombo de Paco

24-a de julio 2021, numero 13

Redaktas Dmitrij Ševčenko kaj Anna Striganova



Fermo de la 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto (2-a VK)

■ Dima Ševčenko,
Anna Striganova

Malfermis la Fermon Tone, kiu kantis kanton el sia albumo *Repe, ritme, sone*.



Enkondukis la eventon la Unua Vicprezidanto de UEA Fernando Maia. Li emfazis, ke malgraŭ la problemoj, esperantistoj sub la gvido de UEA sukcesis daŭrigi la tradicion de la Universalaj Kongresoj. En la dudeka jarcento ankaŭ estis nuligitaj UK-oj. Tamen en la dudek unua jarcento, dank' al la nuntempaj teknikaj rimedoj, okazas la Virtualaj Kongresoj. Ĉi-jare la VK al-tiris intereson de 1829 partoprenantoj el 105 landoj (aŭ teritorioj).



Sekvis kanto *La lasta rozo*, omaĝe al la samideanoj-esperantistoj forpasintaj dum la monatoj de la tutmonda pandemio. La kanton plenumis la Internacia Esperanta Koruso.

La Ĝenerala Sekretario de UEA Aleks Kadar anoncis ke estas 96 personoj, kiuj ricevos diplomojn pro la multjara membreco en la Asocio.

Poste Orlando Raola, estrarano de UEA, anoncis kaj gratulis la gajnintojn de la Oratora Konkurso (vidu informon en la 11-a numero de *La Kolombo de Paco*).

La ĉi-jara premio *Onisaburo Deguĉi* iris al Stefan MacGill, konata Esperanta aktivulo, organizanto de pluraj AMO-seminarioj, eksa estrarano kaj Vicprezidanto de UEA.

Aleks Kadar anoncis la premiitojn de la diplomoj de UEA pro Elstara Agado kaj Elstara Arta Agado. Plenan liston de la diplomitoj kaj aldonajn klarigojn vidu en la sekva numero de *La Kolombo de Paco*.

Duncan Charters, la Prezidanto de UEA anoncis novan membron de la Honora Patrona Komitato de UEA – Marco Lucchesi el Brazilo, brazila verkisto, esperantisto kaj profesoro de la Federacia Universitato de Rio-de-Ĵaneiro, prezidanto de la Brazila Beletistika Akademio. Post la anonco estis montrita video-mesaĝo de Marco, kie li parolis en Esperanto.



Marco Lucchesi

Amri Wandel rakontis pri la sukcesaj IKU kaj AIS-kursoj, IKU-libro, Scienca Forumo (pli detale vidu la apartan artikolon en tiu ĉi numero).

Fernando Maia diris, ke ne estos rezolucio de la Kongreso. Ĉar ni daŭrigas la agadprogramon "Paco, Konfido kaj la internacia lingvo Esperanto". Fine de la jaro estos la resumo, Fernando invitis ĉiujn kunlabori pri la temo.



Sekvis Vicprezidanto de UEA Trezoro Huang Yin-bao. Li parolis pri la agado ĉe Unesko (vidu la informon en tiu ĉi numero, p.3).

Peter Baláž, la kunordiganto de E@I, la organizo, kiu teknike organizis la 1-an kaj la nunan 2-an VK-ojn, prezentis la teknikan teamon, rakontis pri la defioj rilate al la organizado de retaj eventoj. Li esprimis esperon, ke tiu ĉi sperto helpas ankaŭ estontece okazigi similajn eventojn, ĉu aparte, ĉu en la kadro de la fizikaj Universalaj Kongresoj de Esperanto.



Poste la Internacia Koruso adiaŭis la irlandan LKK kaj la kongresurbon Belfaston per la kanto *Irlanda Beno*.



Orlando dankis Fernando Maia, la ĉefan organizanton kaj inspiranton de la VK-oj.

Li komunikis, ke la IJK okazos virtuale inter la 30-a de julio kaj la 8-a de aŭgusto 2021. Ĝi troviĝos en la nova platformo. Krome okazos la virtuala kongreso de ILEI – VEKI, inter la 7-a kaj 14-a de aŭgusto 2021. Dum ĝi estos aranĝita simpozio pri Esperanto en altlernejoj kaj pri perspektivoj krei Esperanto-universitaton. Ĉeesta evento – renaskiĝo de la Universala Kongreso, ĝi okazos en 2022 en Montrealo. Li tre esperas, ke ĝi, planita por 2020, finfine realiĝos en 2022. Montrealo atendas la mondan esperantistaron al tiu ĉi festego kaj festivalo de Esperanto!

Fermis la 2-an VK-on filmeto, kie kongresanoj kantas *La Esperon* dum la 72-a UK, kiun gastigis Varsovio, Pollando, en 1987. Tiu ĉi Kongreso okazis en la jaro de la 100-jariĝo de Esperanto kaj allogis rekordan kvanton da partoprenantoj.

Kaj nun Duncan Charters deklaris la 2-an Virtualan Kongreson de Esperanto fermita.

La fermon de la 2-a VK, samkiel plurajn aliajn programerojn, vi povas re-spekti en la retsistemo de la Kongreso: <https://vk.retevent.com>.

La Kongreso fermiĝis, sed nia aktiva agado por Esperanto daŭras!



IKUE surpodiis ĉiu-tage

Marija Belošević, prezidantino de IKUE

Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista dum la VK surpodiis ĉiu-tage, sed ĉiam kun aparta temo. Krom la prezento de la historio de la 111-jara organizo (fondotago: 01.04.1910), estis prezentita la nuna agado. Al tio aldoniĝis la prelegoj-prezentoj: de la kristanaj libroj kaj kantoj en Esperanto, Espero Katolika (ĝi aperas de la 1903!), portalo fontoj.net.

Unu sesion de ViMF oni dediĉis al la memoro de Antonio De Salvo (08.06.1942.-21.03.2021) kiu estis membro de IKUE kaj ĝia prezidanto kaj elstara itala esperantisto. Ni aldonu ke UEA donis en la jaro 2019 al li la Diplomon pro la Elstara Arta Agado. Dum la fakkunveno, i.a. okazis la prelego de Milton Paulo De Lacerda "Pri revoj kaj trafoj".

Ni aldonu, ke la apero de IKUE en la "virtuala" mondo dum la pasinta jaro iĝis tute normala. Pasintjare okazis la "Virtualaj tagoj de IKUE (katolikaj Esperantistoj)". Dum tiu aranĝo la partoprenantoj esprimis la deziron daŭrigi la virtualajn kunvenojn. Unue semajnaj, ili transformiĝis al ĉiutagaj kunvenoj je la 20:15h (UTC+2) ĉe ZOOM, dum kiuj oni kunpreĝas kaj kundiskutas, ofte eĉ okazas prelegoj. Nun estas preparata ankaŭ la Virtuala kongreso de IKUE (14.-21.08.). Kiu interesiĝas, povas peti pli da informoj ĉe: ikue.reto@gmail.com.





Resume pri la sciencaprogramo dum la 2-a VK

■ Amri Wandel

(parolado dum la ferma ceremonio)

Karaj gekongresanoj, oni petis min resumi la sciencan programon de la kongreso.

Kiel la plej bona resume mi rekomendas la IKU-libron, kiu estas senpage elŝutebla en <http://iku2.trovu.com/>.

Kiel en la antaŭaj kvar jaroj ĝi aperas libroforme, altkvalite grafike kaj enhave. Per ĝi eblas bone demonstri la valoron de Esperanto ankaŭ sur la kampo de scienco.

Elŝutis ĝin jam pli ol 800 personoj. Efektive post nelonge ĝi aperas ankaŭ paperforme kaj estos mendebla en la libroservo de UEA.

En ĝi oni trovas la tekstojn de 8 IKU-prelegoj, 4 prelegoj de la Scienca Kafejo.

La nombro de aŭskultantoj variis inter 50 kaj 160. La temoj tre variis, inter natursciencoj, medicino, literaturo, lingvaj rajtoj kaj pli.

La 74-an sesion de Internacia Kongresa Universitato rektoris Michele Gazzola, kiu lerte prezentis la prelegantojn.



AKADEMIO INTERNACIA DE LA SCIENCJOJ

Internationale Akademie der Wissenschaften – Académie Internationale des Sciences – International Academy of Sciences

ATESTO

Kursgvidanto / Kunordiganto de la prelegserio

Oprof. Amri Wandel (Israelo)

(nomo kun sciencistaj gradoj kaj titoloj – loĝ- aŭ deĵorlando)

Edmond Privat

el / aus / from / de Svisio

ĉeestis mian kurson (la de mi kunordigitan prelegserion)

besuchte den größten Teil meines Kurses (der von mir koordinierten Vortragsreihe)

has attended most of my lectures (lecture series organised by me) on

a visité la plus grande partie de mon cours (de la série des conférences coordonnée par moi) sur

Nigraj Truoj kaj Gravitaj Ondo

(titolo de la kurso aŭ prelegserio okazis ekzameno)

ekde / von / from / du 17/7/2021

ĝis / bis / to / jusqu'au 24/7/2021

La kurso okazis kadre de

Den institutionellen Rahmen des Kurses bildete
The course was held within the framework of
Le cours a eu lieu dans le cadre de

Internacia Kongresa

Okazis kvar IKU-AIS kursoj, konsistantaj el po du prelegoj, fine de ĉiu okazis ekzameneto. Entute ekzamenigis 50 personoj, ĉiuj sukcesis – kio ne estas evidenta: la ekzamenoj ne estis facilaj! La statistiko aperas en la kuriero, *Kolombo de Paco* n-ro 12. Ĉiuj partoprenintoj ricevos AIS-ateston retpoŝte.

Hodiaŭ okazis la Scienca Forumo, dum kiu, krom resume de la sciencaprogramo en la VK estis diskuto pri sciencagado en Esperanto – pasinteco kaj estonteco.



Movado ĉe Unesko

■ Trezoro Huang Yinbao

Karaj kongresanoj,

dum la kongreso ni diskutis pri nia movado ĉe Unesko. La Estraro dumaniere antaŭenigas nian movadon ĉe Unesko.

Unuflanke ni multe kontribuas al realigo de la Celoj de Unesko. Ni daŭre kunlaboras en eldono de *Unesko-Kuriero*, eldonis Unesko-librojn, eldonis ĝis 63 librojn en la serio Oriento-Okcidento, kontribuis al Unesko-enketo pri “Estonteco de Edukado”, aktive partoprenis en multaj eventoj lanĉitaj de NRO-Liga Komitato. Tra la agoj ni streĉe disvastigis la idealojn kaj la valorojn de Unesko, kaj sufiĉe vidigis la utilecon de nia lingvo al Unesko kaj ĝiaj Membroj Ŝtatoj.



Aliflanke ni milde petis Uneskon subteni nian lingvon. La Ĝeneralaj Direktoroj akceptis niajn petojn, dufoje sendis salutan leteron al niaj kongresoj en 2018 kaj ĉi-jare. Nun ni lanĉis la kampanjon, por konvinki Uneskon deklari la Internacian Tagon de Esperanto dum 3 jaroj. Post sukceso de la kampanjo, ni planas konvinki Uneskon agnoski Esperanton kiel la Tutmondan Kulturajn Heredaĵon, kaj konvinki ĝin deklari trian Rezolucion.

Ĝis nun 30 landaj asocioj aliĝas al la Kampanjo, kaj 10 landaj asocioj iniciatis la proponon al instancoj en siaj landoj. Ni jam sendis oficialan petleteron al Unesko.

La kampanjo estas ege malfacila tasko, tamen vere endas klopodi. Mi kredas ke ni absolute gajnos almenaŭ en informado al Unesko kaj al ĝiaj Membroj Ŝtatoj, eĉ se ni malsukcesus. Ni klopodu por sukcesigi la kampanjon.





Mondovizio: talento-konkurso

Homoj el la tuta mondo kunhavigis sian talenton kun vi! Okazinta la unuan fojon dum la reta IJK de 2020, la konkurso Mondovizio, kun siaj belegaj kaj ĉarmaj prezentantoj, revenis por la 2-a Virtuala Kongreso! Ĉi tiu “juvelo en la krono” de la junulara programo de la VK aspektas kiel tradicia internacia vespero, sed ĝi estas pli moderna, pli internacia kaj pli konkurenca ol vi imagas! Ĉu pere de kanto, laŭtlegata poemo, teatraĵo aŭ eĉ montrado de mankreaĵo – ni vidas talentajn kontribuojn kaj bonvenigas ĉiun! Kaj plej grave, la plej bonaj kontribuoj ricevis misterajn ekskluzivajn premiojn! Ariel Bonkorpa, Siru Laine kaj Tyron Surmon prezentis! Manuela Burghilea ĉefgvidis la junularan programon (JuPo) de la VK!

Vi povas re-spekti ĝin ĉi-tie: <https://mallonge.net/g1>

